408.92:52

## ESPERANTO EN ASTRONOMIA UZO

de Prof. Y. Väisälä

profesoro emerita de astronomio kaj fiziko en la Universitato de Turku
direktoro de la astro-fizika instituto »Tuorla«
membro de la Akademio de Finnlando

En la amatorastronomia revuo »Tähtitaivas«, eldonata de la societo Turun Ursa (Ursino de Turku) aperis dum pli ol dek jaroj **Resumo en Esperanto**. Ekster la artikoloj dediĉitaj al amatoroj, en la revuo aperis referatoj pri novaj sciencaj planoj, kiuj estis iom pli detale resumataj en Esperanto ol la unuenomitaj.

Mi persone uzis en astronomia korespondo Esperanton dum multaj jaroj kun hispana astronomo. Ankaŭ mi uzas Esperanton, kiam mi respondas al leteroj skribitaj en lingvo fremda al mi. Ekzistus ja ankaŭ la alternativo respondi finne, sed mi volis esti kompleza per uzo de la Internacia Lingvo, kium la adresato certe komprenis pli bone ol finnan lingvon.

En la leterpaperoj kaj kovertoj de mia scienca instituto la teksto estas presita nur finne kaj esperante.

Ankoraŭ antaŭ kelka jardeko la artikoloj en astronomiaj revuoj kaj publikaĵoj de la observejo estis redaktitaj per la okcidenteŭropaj lingvoj: germana, franca, angla, italia, hispana (ankaŭ portugala), kelkfoje eĉ latina. En Sovetunio nun ĉio estas verkita ruse, kaj nur en la lastaj jaroj aperas ofte angla resumo. En la landoj nerusaj ĉe la limoj de Sovetunio uziĝas multe ĉies loka lingvo, kiu havas specialan alfabeton, kaj la resumo estis ĝenerale rusa; nun ŝajnas kelkfoje aperi ankaŭ anglaj resumoj.

Savo el la situacio estus Esperanto!

40:525

## SPERTOJ DE GEODEZIISTO

de D-ro Erkki Kääriäinen, ŝtata geodeziisto

Kiel geodeziisto mi persone konstatis la eksterordinaran utilon, kiu estas atingebla en internaciaj rilatoj de sciencistoj per Esperanto. Eĉ malfacilaj sciencaj problemoj povis esti facile kaj unusence komprenigataj ekz. inter ni kaj rusaj aŭ japanaj kolegoj sole per uzo de Esperanto.

La lingva problemo en sciencaj kongresoj estas konata. Ĉi tiu evidentiĝis eĉ en tiel malgranda kvazaŭ familia rondo, kian formas la Nordlanda Komisiono por Geodezio. Ĝi kunvenas ĉiun trian jaron, laŭvice en ĉiu el la nordaj landoj. Ĉiufoje precipe ni finnoj povis konstati, ke danan lingvon ni ne komprenas, ĉar ĝi pleje diferencas de la »skandinava« ĵargono, kiun ni uzas en tiuj kongresoj.

Komuna lingvo — apud ĉies gepatra — kondukus ankaŭ ĉi tie al la plej bona rezulto.



# VI
# Biologio kaj Medicino

D-ro Paul Neergaard

401 + 001.4:574/578 + 631/632

## LA LINGVA PROBLEMO EN LA BIOLOGIAJ KAJ AGRONOMIAJ SCIENCOJ.

(prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1962)

### 1. La multlingveco de la scienco.

La plivastiĝinta uzado postmilita de la angla lingvo en la scienco nur ŝajne kondukis al pliiĝinta lingva unueco. La »okcidenta mondo«, t. e. Okcidenta Eropo kaj Ameriko, havas falsan bildon pri la rolo de la angla lingvo, ĉar oni tie neglektas tro multe la sciencajn rezultojn de aliaj mondpartoj. En Orienta Europo kaj Azio la rolo de la rusa lingvo estas suverena, kaj la ĉina scienco vekiĝas kiel estonta giganto en la familio de la kontribuantaj nacioj — tio evidentiĝas i. a. el simpozio, kiun oni okazigis en Usono en decembro 1960 pri la lastatempaj atingaĵoj de Ĉinujo (Science 132: 1628, 1960). Ankaŭ la abunda lingva multeco de la novaj memstariĝantaj nacioj en Azio kaj Afriko ne povas esti neglektata senplue per almontro al estonta uzado de iu aŭ iuj el la naciaj ĉeflingvoj — tiel simpla la afero ne estas en la ekskolonioj de la eŭropaj potencoj. Vere, la graveco de sciencaj laboroj ne dependas de la lingvo propra al la kontribuanto, nek limiĝas naskiĝo de genioj al la regionoj de la ĉefaj lingvoj.

La ekzistantaj statistikoj pri la uzado de la ĉeflingvoj estas tre krudaj. La jenaj nombroj ilustras la taksadon de la lingva situacio en la scienco:

| | Laŭ UNESCO (1957) % verkoj eldonitaj | Laŭ ENDEAVOUR (1958) | Laŭ UNESCO (1957) % sciencistoj komprenan taj ilin |
|---|---|---|---|
| Angla | 53 | 44 | 39 |
| Germana | 10 | 14 | 19 |
| Franca | 9 | 13 | 13 |
| Rusa | 10 | 8 | 13 |